Lifelong Learning Programme

edukado.net

# Sylvain Lelarge: Famaj frisaj bestoj: kvargambaj ĉampionoj

El Frislando devenas tri bestoj, kiuj famigis sian hejmlandon tra la tuta mondo: ni plezure prezentas al vi la frisajn bovinon, ĉevalon kaj hundojn. Jen mallongaj portretoj de tiuj eksterordinaraj ĉampionoj.

## La frisa laktbovino


('ko' en la frisa lingvo, 'koe' /prononcu 'ku'en la nederlanda).



Tiu nigra-blanka laktobovino, kiu kapablas produkti pli da lakto ol kiu ajn alia raso en la mondo, famiĝis laŭ sia angla nomo: **Holstein Friesian.** Holstein referencas al parto de norda Germanio, kiu apudas la nordon de Nederlando kaj Frislando. En la pratempo tiu regiono estis ero de Frislando.

Historie, la frisa bovino estas krucaĵo de nigraj bovinoj devenaj – kun siaj posedantoj – el Hesse (Germanio) ĉirkaŭ la jaro 100 post Kristo kaj de la blankaj/helaj bovinoj de la popolo (la frisoj), kiu jam tiam vivis en Frislando. Tiuj frisoj preferis pagi al la romianoj tributon (en formo de bovoj) ol iri militi por ili. Tion jes ja faris la pli suda popolo de la nuna Nederlando, la batavoj. Tiel komencis famiĝi la frisaj bovinoj.

La herboriĉa Frislando estis ideala tereno por bredi bovinojn, kaj la frisoj – per selektado – sufiĉe frue komencis



krei rason kun grandaj produktokapabloj, vianda kaj lakta. Ili sukcesis en tiu selektado per bona organizado, kiu ebligis eviti pariĝadon ene de la sama bovfamilio. La kvalito de la bestoj plie famiĝis. Ĝis la 18a jarcento la britoj alportis al sia lando multajn frisajn bovinojn, el kiuj fontis diversaj britaj bovinrasoj. Dum la 19a jarcento, ili amase eksportiĝis al Nord- kaj Sudameriko. Sendube, el tiuj transoceanaj frislandulinoj, la plej honorata bovino estis *Pauline Wayne*, kiu iĝis inter 1910 kaj 1913 la ŝatbesto de la tiama prezidento de Usono, William Howard Taft. Ĝi vivis sur la kampo, vid-al-vide al la Blanka Domo, kaj oni diras, ke la prezidenta familio konsumis nur ĝian lakton.




En Eŭropo, ĝi estas uzata norde ĉefe pro sia lakto, kaj sude precipe pro sia viando. En 2008 la averaĝa laktoprodukto de la frisaj bovinoj en Usono atingis 10 443 kilogramojn, inklude 380 kilogramojn da butergraso. Kompreneble, tiaj bovinoj estas ekspluatataj ĝisoste kaj vivas nur por naski trifoje, kaj jen ĉio.

Viktimoj de sia sukceso, ili transformiĝis al laktomaŝinoj, kiujn la sciencistoj de tutmonda kompaniegoj, kiel ekzemple MONSANTO, provadas nuntempe ne nur influi per hormonoj, sed eĉ kloni. La frisa bovino eĉ elektiĝis kiel simbolo por filmo, kiu dokumentas la misagojn de la agrikultura industrio. Sur la frisaj herbejoj iliaj prapatrinoj certe ĝuis pli 'homan' vivon.

*Filmojn pri tiu bovinraso vi povas spekti klikinte al: vidu http://www.npo.nl/andere-tijden/22-01-2012/NPS_1198646 (historio) kaj https://www.youtube.com/watch?v=IFatvYjIIqU (ĝojaj bovinoj kiuj unuafoje en la jaro eliras al la herbejoj ☺)*

# La frisa ĉevalo

('Frysk hynder' en la frisa lingvo, 'Fries paard' /friis paard/en la nederlanda)



Jam la romianoj valorigis ĝiajn kvalitojn kaj volonte uzis ĝin kiel batalĉevalon dum la konkero de Britio. Frisaj ĉevaloj estis verŝajne jam 3000 jarojn antaŭe uzataj de la kamparanoj.
Dum la mezepoko, ili famiĝis – denove kiel militĉevaloj – kaj la 'Okdek jarojn longa milito' (sendependiĝo de Nederlando el la hispana imperio - 1568 – 1621) estis okazo pliriĉigi iliajn genojn per parigado kun hispanaj rasoj, precipe el Andaluzio.
Tamen montriĝas ĉe la frisa ĉevalo la samaj kvalitoj kaj trajtoj, kiuj famigis ĝin en la pasinteco: tutnigra fortika besto kun belegaj ondformaj hararo kaj vosto, inteligenta kapo kun mallongaj, pintaj kaj moviĝemaj oreloj. Ĝia kolhalteco altas ideale 1,60 metrojn.



Tradicie la ĉevalo vivis en farmo, do tiris la plugilon dumsemajne kaj la kariolon (la duradan frisan 'sjees') kun siaj posedantoj dimanĉe. Sed ankaŭ sub la selo montras ĝi grandajn kvalitojn, kiuj farigas ĝin tre ŝatata raso por la dresistoj. Ĝia amikema kaj lojala karaktero amigas ĝin al ĉiuj. Ekstreme inteligenta, lernema, vigla, ĝi estis elektita por roli en pluraj mondfamaj filmoj, inter aliaj en '*La masko de Zorro*' kaj '*Aleksandro*'. Ĝi eĉ iĝis la dia ĉevalo '*Pegazo*' en '*La kolizio inter Titanoj*'. La fama verkisto Dan Brown elektis ĝin por roli en lia plej freŝdata libro: '*Inferno*'.
Nur por saltado ĝi ne taŭgas. Ne estas ĝia naturo, nek la celo de ĝia dresado.
Sendube ĝi revigas ĉiun, kiu ĝin renkontas. Dum la jaroj 60 de la pasinta jarcento, ĝi estis en danĝero formorti, sed nun, danke al entuziasmaj frisaj bredistoj, ĝi denove konkeras la mondon kaj havas belan estontecon antaŭ si.

*Filmojn pri la frisa ĉevalo vi povas spekti klakinte al* *https://www.youtube.com/watch?v=PBGWooBiip0* *kaj* *https://www.youtube.com/watch?v=cDiyYFHvfMI*

# La frisaj hundoj

('Fryske hûnen' en la frisa lingvo, 'Friese honden' /frize honden/ en la nederlanda)



Ni skribas plurale ĉar ekzistas 11 rasoj. Jen sube la prezento de la du plej konataj: la tielnomataj 'stabil' (vidu ĉi dekstre) kaj 'wetterhûn'.

La **'stabil'** estas ĉashundo por birdoĉasado; ĝi lerte kaptas ankaŭ talpojn, ratojn, eĉ putorojn, kaj protektas la domon. Ĝia robo estas nigra-blanka, bruna-blanka, nigra aŭ bruna. Averaĝe altas ĝi 50 centimetrojn. Verŝajne, ĝi fontas el 'ŝpanjol'-hundoj, venintaj al Nederlando kun la hispanaj militistoj dum la supre menciita 'Okdek jarojn longa milito'.

'Stabil' – kiel ĉashundo – havas grandajn kapablojn: ĝi kaptas kaj signalas la odorindikojn, levante sian antaŭan gambon kaj ĉesante movi sin. Ĝi bonege naĝas kaj povas tiel alporti al sia posedanto la mortpafitajn birdojn. Krom tio, la 'stabil' tre taŭgas kiel hejma hundo: ĝi estas amikema, entuziasma, kaj ĉarma kun la infanoj. Ĝi vivas inter 12 kaj 14 jarojn kaj estas konata kiel sana raso.



La **'wetterhûn'** ekzistas en la samaj kolorkombinoj kiel la 'stabij', sed ĝia felo buklas. Ĝi utilas same kiel la 'stabij', por birdoĉasado, kaptado de talpoj, ratoj, eĉ lutroj, kaj protektado de la domo. Ĝi estas tre trankvila, pacienca, kaj plej bone fartas ekster la domo, precipe en la naturo.

Filmojn pri tiuj du frisaj hundrasoj vi povas spekti klakinte al https://www.youtube.com/watch?v=mGbipibuvcY kaj https://www.youtube.com/watch?v=dNl3LQ8JcBk

---

Fontoj: vikipediaj artikoloj